

BIBLIOGRAFIA GAZETO



Redakcio kaj administracio
Hungarujo, Budapeŝt, IX.,
Mester ucca 53, V. 7. —
Telefonnumero: 380-84

REDAKTAS:
K. KALOCSAY

Senpaga por abonantoj de
Literatura Mondo kaj anoj
de AELA. — Aparta abono
1.80 svisaj frankoj por jaro

PRI KELKAJ KRITIKAJ PRINCIPOJ

La Literatura Mondo-eldonejo decidis aperigi apartan kritik-revuon, per tio manifestante, ke ĝi rekonis la eksterordinare signifan rolon, kiun la kritiko devas plenumi en nia literaturo. Ĉi tiu revuo ne volas esti nura recenzaro, kvankam la recenzoj formos ĝian trunkon kaj ni intencos aperigi plurajn recenzojn pri samaj libroj, akceptante recenzojn ajnvidpunktajn, kondiĉe, ke ili estos verkitaj interese: sed ĝi volas okupiĝi ankaŭ pri ĝeneralaj studoj koncerne la kritik-arton kaj pri konigo de kritikaj tendencoj ĉu universalaj, ĉu speciale esperantaj.

Permesu, ke en la nuna numero mi parolu iom pri kelkaj sekvindaj kritikaj principoj, plie etikaj, ol pure artismaj.

Unue: la kritikisto rigardu ĉiam la verkon, kaj ne la verkinton. Personajoj de l' aŭtoro estu atentataj nur, se ili nepre necesas por klarigi la verkon. Neglekto de ĉi tiu grava postulo alportas perdon de l' objektiveco, kiun ĉiu kritikisto devas fiksi al si cele, se li ne volas iĝi simpla reklamisto aŭ pamfletisto. Insisto pri apudaj cirkonstancoj, spertoj akiritaj per persona kontaktiĝo kondukas al la danĝero, ke anstataŭ serioza kritiko oni skribas klaĉaĵon aŭ atakaĉon kontraŭpersonan.

El la postulo de l' objektiveco sekvas, ke la kritikisto devas kiel eble pleje sendependiĝi sin de ĉia influo ekstera, kaj de ĉiaj antaŭjuĝoj kaj baroj internaj. Mi aludas pri ligoj, kiujn altrudas raso, klaso, eduko, k. t. p. Kompreneble centprocentan liberigiĝon oni ne povas postuli, ja ankaŭ la kritikisto estas homo.. Kaj ĉi tiu postulo tute ne malhelpas, ke la kritikisto mem havu forte akcentitan mondrigardan sintenon. Temas nur pri tio, ke lia sinteno ne influu lin, kiam li kritikis verkon, kiu havas alian, eble eĉ kontraŭan sintenon. Lia devo estas: konstati, kion intencis la aŭtoro kaj kiel li sukcesis realigi sian intencon. Se la tendenco de la verko ne plaĉas al la kritikisto, li povas ĝin ataki, sed nur per argumentoj bone prezentitaj. Neniel per senmotivaj asertoj kaj per falsigo de la senco de l' kritikita teksto, kiel enmodiĝis lasttempe en Esperantujo.

703292-03

La kritikisto menciis la trovitajn mankojn, sed li gardis sin de ekskluziva sindono al flarado pri ili. Pure negativa kritikado atestas pri malplena, malsana animo.

La kritikisto neniam laciĝis en la pliprofundigo kaj plilarĝigo de sia kulturo, kaj li ne kaŝis la akiraĵojn, eĉ se iuj akuzos lin pri »snobismo«. Internacia literaturo ja devas iĝi komuna trezorejo de ĉiuj kulturoj, kaj ne ia malriĉa, sensuka abortaĵo, kia ĝin volus fari tiuj, kiuj tuj vekias pri »nekompreneblo al orientanoj«, sed ili trovas naci- aŭ klasikdevenan kulturelementon.

La kritikisto kritikis la verkon, ne la personon de la aŭtoro, sekve ankaŭ en sia stilo li klopodu al objektiva tono. Severe, eĉ senindulge oni povas kritiki per ĝentila voĉo. Kaj se la aŭtoro trovas personan atakon tie, kie ĝi ne estis, se li ofendiĝas, kiam ne estis kaŭzo, la kritikisto bedaŭru la miskomprenon, sed kun pura konscienco li pluiru sian vojon, ĉar li agis en la intereso de nia literaturo.

La kritikisto zorge esploru la formon eksteran kaj internan de l' verko. Li konsciu, ke el arta vidpunkto pligravas la »kiel« ol la »kio«, sed li ne forgesu, ke la Arto estas nur ilo kondukanta al la pliperfektigo de l' homo. Kaj li konfesu, ke ĝi estas la plej nobla, la plej supera, eble la ununura ilo... Li konfesu la *esencan* sendependon de l' Arto de historiaj, geografiaj, rasaj kaj klasaj faktoroj, li rekonu, ke provizore povas ĝin makuli influoj, tendencoj, sed li vidu klare, ke ili restas nur surfacaj, ke la sentempan, internan substancon ili ne povas infekti: li konfesu, ke la Arto supervivos krizojn, kataklismojn, ĝis sola homo vivos sur la Tero...

Ludoviko Totsche.

R E C E N Z O

ESTONA ANTOLOGIO. I. Eldonejo: Esperanto-Asocio de Estonio, Tallinn, 1932. 22×15 cm. 136 pĝ. Prezo: 2.— mk. + 10% por sendkostoj.

Esperanto ĉiam pli kaj pli alprenas la karakteron de kulturmovado, evidente atestas tion la nivel-altiĝo de ĝia originala literaturo kaj la multflanke orientita klopodo por alproprigi la trezorojn de l' naciaj kulturoj. Kaj mi pensas, ke ĝuste per tiu ĉi orientiĝo esperanto ektrovis sian historian mision: iĝi ekparoligilo de sinteza, pure homa kulturo.

Kaj ne estas kontraŭdiro, se la vojo kondukanta al ĉi tiu pli perfekta — ankoraŭ ne ekzistanta — supernacie unueca kulturo nin gvidas tra la konigo de l' ekzistantaj naciaj kulturoj. Ja estus erara vojo, se la *lingvo* esperanto volus okupi la lokon de la multkolora brila kalejdoskopo de l' naciaj lingvoj, kiom tio malriĉigus ne nur la ilojn de l' artisto, sed ankaŭ la esprimeblojn de l' pensanta homo! Ne, esperanto ne forpelu la naciajn lingvojn, sed iĝu apud la nacia, la patrina lingvo ĉies dua lingvo: la homa

lingvo! (La propagandantoj de »unu homaro, unu lingvo« ne pripensas, ke la efektiviĝo de iliaj klopodoj detruus mem la unu lingvon: la neekstermebla instinkto de l' homo al varieceo — se ĝi ne povus elvivi sin en la naciaj lingvoj — nesaveble disfalis ĝin je dialektoj.) Samela kulturo esp-a ne estas malamika al la naciaj kulturoj, kontraŭe, ĝi volas absorbi ilin, ke tiel riĉiĝinte ĝi servu baze al la ĝermanta homa kulturo, kiu estos sintezo, do pli ol nura kunmetaĵo: se la naciajn kulturojn mi komparus al la koloroj de l' ĉielarko, la ĝermantan esp-an kulturon mi povus kompari nur al la blanka koloro, kiu estas ja pli ol nura adicio de la ceteraj koloroj! Ke la esp-a kulturo esploras tiujn elementojn de la naciaj kulturoj, kiuj servas por kunigo, ne por disigo, tio estas ja komprenebla. Sed tiuj ĉi elementoj estas la plej valoraj, ili formas la kulturon laŭ la vera senco de l' vorto!

Post la belga, bulgara kaj kataluna antologioj jen estas antaŭ ni la unua parto de l' estona. Ne bezonas multan klarigon, ke unuavice la »malgrandaj nacioj« aperigas siajn antologiojn. Se oni rigardas historian libron pri la tiel nomata *mondliteraturo*, oni tuj rimarkas la regantan rolon de la literaturoj de l' pleje disvastiĝintaj lingvoj. Tiun nekontesteblan fakton naskis ne la genimalriĉeco de la malmulte regantaj lingvoj, sed simple la baroj, kiujn la apenaŭ konata lingvo levis kontraŭ la internacia validiĝo de l' verkistoj. Ankaŭ el ĉi

tiu vidpunkto esperanto havas la mision rebonigi maljustan situacion.

La ĝenerala bildo, kiun dum la lego de l' antologio la leganto ricevas pri la estona popolo, estas tre simpatia. Kaj la unua kaj restanta impresoj pri ĝia literaturo estas, ke ĝi estas ĉefe *popola literaturo*. En la plej bona senco de l' vorto, do ne pensu pri artifike imitita pseŭdopopola arto, nek pri senkritika, senkondiĉa, sed tiom pli senkomprena kaj malsincera adorado de ĉio, kio devenas el la popolo; sed pri literaturo, kies gvida celo estas batali por la popolo kaj levi ĝian kulturan nivelon. (Kiel interesan *troigon ĉi direktan mi mencias*, ke F. R. Fählmann verkis mitajn rakontojn, kiujn li asertis popoldevenaj. Kiel ni ekscias el la enkonduka studo, li faris tion por »kredigi al la scienca mondo kaj la eksterlandaj inteligentuloj, ke la estona kamparanpopolo estas kulturacio.«) La sorto de la estona popolo ne estis facila: inter la rusa kaj germana muelŝtonoj ĝi devis konstante defendi sian vivon, la lando ne estas riĉa kaj la estono devis pagi per peza laboro sian modestegan viv-nivelon. Agrikultura lando, do ĝia literaturo estas trasorbata per la pripeno de l' kamparana vivo. Batalplena vivo, do ankaŭ la literaturo respegulas la batalojn, kaj tiel ĝin karakterizas profunde radikiginta sociala sento. La ombroj de l' feŭdalisma ankoraŭ fantomas sur la estonaj kampoj:

»Nigra ombro ŝvebas super valo...
»Ĝin postlasis la servutotempo,«

»Por ke ĉesu plenpotenco via,
Ke ekvenku suno orradia,
Ombro nigra, nun jam estus
tempo.«

(K. E. Sõõt-Hilda Dresen.)

Kaj estas honoro de l' estona literaturo, ke ĝiaj verkistoj ekstaris je la flanko de l' subpremitoj, de l' falintoj...

La dua ĝenerala impresio, kiun oni ricevas dum la lego de la libro, estas, ke la estonaj verkistoj rigardas per apertitaj okuloj en la naturo. Ilia lando laŭaspekte ne estas trovaria, sed ili scias ekvidi kaj prikanti la belecojn de l' estonaj kamparoj kaj de l' estona marbordo. Kaj kiel kara estas la ne tre riĉa vegetaĵaro al la estona poeto! (Vere, se iu deziras ekzerci sin pri la nomoj de plantaĵoj, tiu nur legu tradukajojn el la estona lingvo!)

Trian interesan karakterizadon de l' estona literaturo mi vidas en la signifa rolo de virinaj verkistoj. Ne estas hazardo, ke en la estonia esperanto-movado tiel eminentan lokon okupas niaj samideaninoj! Ankaŭ en la estona literaturo ni trovas multajn interesajn poetinajn individuecojn.

Sed ni jam vidu, kion alportas la unua volumo, kiu prezentas la estonan literaturon de komenco, sed kiu jam ampleksas verkistojn ankaŭ vivantajn. La libron enkondukas mallonga karakterizo pri la literaturo kaj la verkistoj

Ĉiujn librojn, recenzatajn en tiu ĉi Gazeto vi povas mendi plej facile de la librofako de Literatura Mondo. Je peto volontege ni sendas liston de enpagejoj aŭ poŝtĉekan enpagilon.

entenataj en la unua volumo. Nu, tiu ĉi artikolo ne kontentigis min. La ĝenerala parto estas trokonciza, mi preferus sintezan historian trarigardon de l' tuta literaturo, la notojn pri la verkistoj mi metus antaŭ la tradukajojn de l' unuopaj verkistoj. La popola poezio kaj Kalevipoeg meritis apartan studon. Ankaŭ ĝenerala rimarko: la poezian kaj prozan parton mi nepre aperigus en apartaj volumoj. Tio multe pli helpus la trarigardeblon de l' tuto kaj bonvenus al verslegemuloj.

La unua verkisto estas la sennoma popolo, ĝin prezentas fabeloj kaj kantoj. La fabeloj estas sufiĉe malfortaj kaj vekas intereson plie nur el folklorista vidpunkto. La formo de l' popolkantoj estas la senrima kvartroko kun aliteracioj. La kantoj temas pri »fraŭla flato«, pri la virokoro, pri la zorgo de patrino, ekparolas ankaŭ la sociala sento (»Tamen devas sklavo naĝi«), sed la ĉefa temo de l' estona popolkanto estas mem la kantado. La estona kantisto estas obsedita de sia propra kanto. Kvankam la ĝenerala nivelo de l' prezentitaj kantoj ne estas tre alta, tamen mi trovis inter ili vere belajn, kiel ekzemple la Belokanton (trad. de H. Seppik) kaj Kantu, buŝeto (trad. Hilda Dresen.) Mi ne povas kontraŭstari la tenton, ke ĉi lastan mi tute skribu ĉi tien:

»Kantu, kantu vi, buŝeto,
vigle voku, birdbeketo,
ridetadu, ruĝbereto,
ĝojegadu, ho, koreto!
Iam vi ja maljuniĝos,
senviviĝos, silentiĝos,

por eterne entombiĝos,
 en la tero vi troviĝos,
 sola en la sablo kuŝos,
 ĉerktabuloj vin ĉirkaŭos.

Kiu donos do trinkaĵon,
 apetitan anseraĵon,
 portos tomben pork-rostaĵon,
 ŝovos sablen ov-fritaĵon,
 al mortinto malt-trinkaĵon?
 Talpo donos la trinkaĵon,
 apetitan anseraĵon,
 portos tomben pork-rostaĵon,
 ŝovos sablen ov-fritaĵon,
 al mortinto malt-trinkaĵon.«

Imagivan bildon mi trovis
 en verso de l' unue prezentita
 poeto K. J. Peterson (trad. Hilda
 Dresen):

»Jen la kantisto nun
 Forte ekkantas kun
 Voĉ' emocioplena.
 Kaj la popoloj,
 Silentante kvazaŭ
 Rokoj, aŭskultas lin.«

En kamparanan domon gvidas
 la kvara akto de l' dramo Luf-
 homo, verkita de August Kitz-
 berg. Temas pri amo de filo al
 adaptita filino de l' gepatroj. La
 amo estas malhelpata de la ge-
 patroj. En la fono regas la su-
 perstiĉemo de l' vilaĝanoj. Tamen
 mi ne trovas ĝusta publikigi en
 antologio partojn de teatraĵo aŭ
 romano, aŭ oni aperigu tutajn
 teatraĵojn, aŭ oni tute rezignu pri
 prezento de l' drama arto (es-
 cepte, se temas pri parto, kiu
 povas efiki kiel memstara tuto;
 sed ĉe Lufhomo ne estas tiel).

De Jakob Liiv estas tradukita
 sub titolo »Ranoj« internacie
 abunde konata fabelo. Kiel traduki

ion, kion ĉiu konas el lernolibroj?
 En la »Helpu!« de Ernst Peter-
 son (trad. J. Törn) la leganto
 konatiĝas kun historio pri malfel-
 iĉa virino, kun multaj infanoj
 kaj ebriema, kruda edzo. La
 prezentmaniero de l' verkisto es-
 tas iom naiva, sed oni ne devas
 prisilenti, ke li havas bonajn ok-
 ulojn por ekvidi la preman so-
 cian situacion de malfeliĉuloj. La
 sceno, kiam la knabo Sassa at-
 akas la ebrian patron por defendi
 la patrinon, ne senas dramecan
 streĉon.

Sendube la plej valora peco de
 l' antologio estas *La dishakita ga-
 leaso* (kial galeaso? ĝi signifas
 grandan ŝipegon, ŝajnas al mi, ke
 barko estus la ĝusta traduko) de
 Jakob Mändmets (trad. August
 Vellner). Temas pri epizodo el la
 vivo de marborda loĝantaro. Akre
 siluetigitaj karakteroj, facile glit-
 anta rakontado, delikata psikol-
 ogio distingas ĝin. La sola prozaĵo
 de la libro, kiu evidente celas al
 arta stilo. Tion komprenis ankaŭ
 la tradukinto. La lastan aŭtoron
 de l' volumo, Eduard Vilde, prez-
 entas du fragmentoj. La unua,
Milito en Maŭtra (trad. Helmi
 Dresen) pripentras la penegan la-
 boron de l' kamplaboristoj. En
 la alia, *La laktisto en Mäe-
 kula* oni konatiĝas kun la vivo
 de etbienuloj. La juna edzino de
 l' ĉefheroo, Mari, estas modelita
 kun artista mano. Bedaŭrinde la
 stilo estas peza, malkonciza kaj
 la traduko ne multe helpas ĝin..

La laboron de l' traduko faris
 Helmi kaj Hilda Dresen, Nikolai
 Karotam, E. Lübek, Agnes Nii,
 H. Sakaria, A. R. Saul, Henriko
 Seppik, J. Temmer, J. Törn, Vil-

lem Vaher, August Vellner. Generala impresio pri la traduko: en ĝi estas uzata korekta lingvo, korekta stilo. Intence artan stilon mi ne trovis, sed tion klarigas ankaŭ la speco de l' tradukitaĵoj. Tamen — krom la jam menciitaj — mi nomu la Belokanton (Seppik), la poemojn de K. E. Sööt, Juhan Liiv (Hilda Dresen), kiuj el stila vidpunkto elstaras. Rimarkoj: mankas tabelo de vortoj netroveblaj en la P. V.; anstataŭ *konkiri* jam oficialas *konkeri*; la libro suferas de *je-epidemio* (plena je, profiti je, ŝtonjeti je kokino!); vortoj, kiel *ovumi*, *grenventumajo*, pruvas, ke ankaŭ certaj vortkunmetaĵoj povas kaŭzi kaprompon, ne nur la neologismoj... Ke oni trovas nur tiom da manketoj, tio pruvas la bonecon de la lingvo. Goje oni legas la imagivan vorton »nubopuŝisto« uzatan de Helmi Dresen.

Resumo: kvankam ne estas en ĝi ĉefverkoj, tamen la unua parto de l' estona antologio meritas la interesigon de la publiko, tiom pli, ĉar la *interesigo* plirapidigos la eldonon de la sekvontaj tri volumoj, kiuj prezentos la modernan estonan literaturon. Kaj la esp-a leganto ja povis konvinkiĝi el la Under-poemaro, el la Tuglas-noveloj, kiajn trezorojn kaŝas ĉi tiu literaturo!

Ludoviko Totsche.

LA KREITAJ PROFITOJ, pulĉinela komedio en du aktoj de Jacinto Benavente, tradukis el la hispana: Vicente Inglada. Eldonita de Hispana Esperanto Asocio. Madrido, 1932. 96 paĝoj. Prezo 1.— sv. fr.

Amuza kaj ĉarma farso. La revema kaj serioza Leandro kaj la ruza kaj facila Krispin, sur kies nuko sidas pli ol peruko, rifuĝas de amasigitaj procesoj el Bolonio kaj venas en novan urbon. Leandro estas senkuragigita. Sed ja ne Krispin, li prenas en siajn manojn la sorton de sia naiva kunulo. Li trudas al li la rolon de ĝentila, grandanima riĉa kavaliro, kaj li mem rolas kiel lia kruda kaj senpolura servisto. En ĉi tiu rolo li mistifikas ĉiujn, prunteprenas por sia sinjoro manĝon, loĝon, monon, admiron de kapitano kaj de poeto, diskretajn amperajn servojn de facil-mora sinjorino, poste li plektas amon inter Leandro kaj filino de parvenuo kun dub-devena riĉo. Kaj kiam la pago de la amasigitaj ŝuldoj ne estas plu prokrastebla li malkaŝas ĉion al la trompigitaj kreditoroj. Ĉi tiuj koleras, indignas, furiozas, sed poste, kion fari, vole-nevole ili rekonas la pravon de Krispin: ili devas helpi Leandron por la geedziĝo kun la riĉa filino, por povi ricevi sian monon el la abunda doto. Kaj vere, havante tiamaniere *kreitajn interesojn* pri la bonstato de Leandro, ili venkas ĉiujn malhelpojn, kvankam ili devas venki eĉ Leandron mem, kiu vere enamiĝis kaj volas rifuzi la manon de la bela knabino, al kiu li taksas sin neinda; per ĉi tio li nur plie konkeras la koron de knabino: la ruza Krispin ja kalkulis en siaj planoj ankaŭ pri amo kaj ideal-eco.

Ĉio ĉi okazas antaŭ ni tre vige kaj amuze, spicite per spritaj parolturnoj kaj trafa karakterpentro.

Kiel mi diris, amuza kaj ĉarma farso.

Parolante pri la traduko, oni kompreneble ne povas citi gramatikajn erarojn kaj malkorektajn ojn el la laboro de l' eminenta tradukinto kaj, se oni ne metas specialajn pretendojn, oni povas ĝin diri bona kaj laŭdinda. Tamen, mi pretendus iom pli ol nuran tradukon laŭsencan kaj laŭvortan; la vera kaj inda tasko estus la kreo de tiu facila stilo, kiu estas necesa en tiaj facilaj ludoj. Vere, en tiaj tradukoj oni bezonus ne tiom simplan *tradukon*, kiom *transverkadon*, dum kiu oni konsideras la egajn diferencojn inter la nacilingva kaj esperantista aŭskultantoj kaj inter la rapideco de la hispana kaj Esperanta lingvoj. Longaj parafrazoj, fraz-intermetoj, kiuj al nacilingva aŭskultanto estas tute naturaj kaj facilaj, en Esperanto iĝas diable komplikitaj, kelkfoje prezentas pli-malpli malfacilajn enigmojn. Tiajn enigmojn oni eble senpene solvas legante, sed la plejmulto tute fiaskas pri ili aŭskultante.

Nu, rilate al la plenumo de l' supre nomita tasko la eminenta tradukinto bedaŭrinde restis ŝuldanta. La stilo de la teatraĵo tute ne estas »teatra«, ĝi estas implikita, peza, longema; mi estas certa, ke la komedio en tiu ĉi traduko tute ne havus sukceson sur la scenejo: ĝi estus laciga kaj enuiga, kvankam la originalo ŝajnas esti freŝa kaj interesa.

Krome, eĉ se oni ne dishakas la longajn frazojn, al ni ŝajnas, ke oni povus multfoje trovi vortordon pli klaran, pli evidentigan,

ol tiu de la tradukinto. Jen ekzemplo:

»ĉar estas karaktero de la naskitaj, kiel mi, en la libera reĝlando Ruzujo, ne fari restadon en iu ajn loko, se ĝi ne estas devigita ĉe pungalero, kiu estas tre malmola restado.«

(ĉar kiu naskiĝis, kiel mi, en la libera reĝlando Ruzujo, ties karaktero estas: restadi en neniu loko, se nur ne devigite en pungalero, — certe tre malmola restado.)

Same ĝenas kaj multfoje eĉ konfuzas la ofta uzo de nenecese komplikitaj vortkunmetoj; la ofta kunfando de adjektivo kaj substantivo, ekzemple: plenkonfidateco, laŭvicesprimi, tranoktevagadi, vanpromeso, frupereigi, gravpersono, ĝustloko, fidelamiko, viglobservado, samtroviĝi, senfinama, pruvenskribiĝi, trafdistingi, tedĝeni, ordarangĝi, premembaraso, premebezoneco, kunamiko, observevidi, respondamanta, respondepagi, malalteranga, malgajesti, pruesti, personamaso. Ege tedaj estas la tute nekutimaj *mal-kunmetaĵoj*: malnobelo, maldigi, mal-embarasi, malkaresi, malsavi, malĉarma, malerare, malplezuro, maldiafaniĝi, mallogi — ĉe kelkaj oni vere devas cerbumi, ĝis oni rekonas la sencon deziritan. Malplaĉaj estas: belvidiĝi (belaspekti), plejigi (troigi), konvinkiga (konvinka), haltadi (restadi), sendita (eksigita). Stranga vorto estas *enamita* (enamiginta), ĝi supozigas, ke ekzistas la verbo *enami* (igi amanta). Strange uzas la tradukinto la konjunkcion *nek*. Ekzemple:

»Por kio grava la rivero, nek malnoveco nek noveco.«

(Kiom gravas la rivero kaj malnoveco kaj noveco.)

»sen la protekto de edzo, nek parencoj, nek proksimuloj...«

(protektata nek de edzo, nek de parencoj, nek de proksimuloj.)

Erara estas ofte la loko de *ne*, ĉar ĝi ne estas metita antaŭ la vorton, kiun ĝi rilatas: tio ne min kontentigas (... min ne.); ne min! (min ne!); vi ne ĝin komprenis (vi ĝin ne komprenis); mi ne estas kulpa, sed mia edzino (ne mi estas kulpa, sed...); ne sole mi rimarkis tion (ne sole tion mi rimarkis).

»Kutima besto estas la homo« havas alian sencon, ol kian la tradukinto volis esprimi: »besto de kutimo estas la homo«, aŭ »la homo estas kutimbesto«.

Cu antaŭ *kiam ol* estas preseraro?

Se mi resumas miajn impresojn pri la libro, mi devas diri, ke mi plezure ĝin legis, sed en ĉi tiu plezuro, kiun mi dankas al la valoro de l' originalo, la traduko ne multe min helpis. Ĝi ŝajnis al mi iel eksmoda, mal-freŝa, kvazaŭ el la unuaj tempoj de nia lingvo. De tiam la esprim-povo de Esperanto multe evoluis. oni devas uzi ĝiajn akiraĵojn, la naturecon kaj flekseblecon, kiujn zorge kaj talente ellaboris niaj grandaj stilistoj. Eĉ, en tia tasko oni devas mem plu evoluigi, por krei la facilan, naturan »teatran«

stilon, kiu al ni evidente mankas ankoraŭ. Car, se oni uzas por tia traduko lingvajon taŭgan nur por sciencaj pritraktadoj, per tio oni nur unu plian fojon pruvas, ke traduki ion ankoraŭ ne signifas ĝin konkeri. *Kopar.*

JULES ROMAINS: KNOCK, aŭ La Triumfo de Medicino. Komedio en tri aktoj. El la franca: D-ro Pierre Corret. Dua eldono. 80 paĝoj. Eldonejo: »Esperantista Voĉo«, Jaslo, Polujo, 1932. Prezo 7,50 fr. fr. + 10%, broŝurita.

En sia poezio »unanimista« Romain prikantus kolektivajn sentojn per stilo sincere simpla, per lingvo konscie klara. La fonto de lia lirikista inspiro troviĝas en la socio kaj same la socio donas la fonon al liaj dramoj, en kiuj lia lirismo pariĝas kun stranga, pika humuro. En Knock per vere Moliera-a vervo kaj sprito li inversas la temon de la »Imagita malsanulo«: la kuraciston, kiu imagigas malsanojn al sanuloj.

La temo estas tiom brile el-laborita, ke indas sekvi kun pli preciza observo ĝian evoluon. La unua akto sceniĝas en aŭtomobilo kaj gvidas nin en mezon de l' okazajoj. D-ro Knock aĉetis de sia kolego, d-ro Parpalaid la klientaron de provinca urbeto (laŭ franca kutimo kuracisto, kiu ĉesigas sian praktikadon en iu urbo, vendas al sia posteulo sian klientaron). la aĉeton li faris *blinde*, sen antaŭa priesploro de sia estonta agadkampo. Nun en la aŭtomobilaĉo de Parpalaid li veturas al la urbeto kaj el la dumvojaj interparoladoj iom post iom klar-

Vi ricevos multe pli por via mono en la estonto, se vi ne forgesas la devizon: Propagandu por AELA kaj LITERATURA MONDO.

iĝas antaŭ Knock, ke lia kolego trompis lin: li aĉetis neekzistantan klientaron, en la urbeto kaj en la tuta regiono vivas preskaŭ tute sanaj homoj kaj la kelkaj apopleksiuoj kaj kor-malsanuloj mortas »sen ia helpo de la kuracisto«; kaj se tamen troviĝus paganta paciento, tiu pagas nur la tagon de Sankta Miĥaelo, la solan enspez-tagon de la kuracisto en ĉi tiu provinco. Nu, sed se temas pri trompo, Knock ne restas ŝuldanto al sia kolego: li devigis sin je kvaronjaraj partopagoj, sed li aĉetis la neekzistantan klientaron per neekzistanta mono: la monon li volas akiri per kuracistaj honorarioj... Bela komika situacio: post la unua kvaronjaro klariĝos, kiu supertrompis la alian? En la dua akto ni vidas la strategiajn movojn, kiujn Knock faras por konkeri la urbon kaj ni konatiĝas pri lia gvidideo: sanuloj ne ekzistas, nur nekonsciaj malsanuloj, kaj la tasko de la kuracisto estas igi konsciaj ĉi tiujn sensuspektulojn, por ke per la helpo de la medicino ili kontraŭbatalu la kaŝiĝantan malsanon. La tria akto: plena triumfo de Knock. Post la paso de l' unua kvaronjaro d-ro Parpalaid, kiu venas por enkasigi la unuan partopagon, jam trovas sanatorion plenan de malsanuloj, kaj la komiko de la situacio kulminas, kiam li, teoria kontraŭulo de Knock, iĝas lia sanatoria paciento.

Sed Knock estas pli ol nura situacio-komedio, kaj ĝia ĉefheroo estas pli ol nura ĉarlatano aŭ senkonscienca monavidulo; ĝi estas pli ol precize reflektanta speg-

ulo, en kiu oni rekonas la kredeman, influigeman amashomon kaj en kiu nude videbliĝas kelkaj risortoj de homaj intereso: Romans sondas pli profunde, en Knock li verkis satiron pri la fakhomo, en kiu ĉiam pli kaj pli superregas la *fakulo* kaj perdiĝas la *homo*... Parpalaid: »Nur medicinon vi konsideras... Sed kio pri la cetero? Cu vi ne timas, ke pro ĝeneraligo de via metodo iel malfortiĝus aliaj partoj de la socia vivo, inter kiuj tamen kelkaj estas interesaj?« Knock: »Min tio ĉi tute ne koncernas. Mi nur medicinas.« Cu eraras la nuntempa leganto, se en mondo, en kiu fakaj konferencoj disponas pri la sorto de l' homaro, li sentas en d-ro Knock tragike subpentritan simbolon de epoka malsano?

Koncerne la tradukon unue ni devas gratuli la eminentan tradukiston pro la ĝusta elekto de l' tradukotaĵo: tre grava problemo de nia traduka literaturo, kiun oni ne ĉiam feliĉe solvas... La lingvo de la Esp-a Knock estas nepre korekta, eble iom pedante korekta. Tiu ĉi pedanteco neniel malhelpas la ĝuon de la leganto, sed ni konfesu sincere, ke ĝi ankaŭ nemulte helpas ĝin... Precipe ĝenas tiu ĉi stila malavantaĝo en la dialogoj de la unua akto, en la dua kaj tria aktoj la dialogoj jam plivigliĝas. Mi ne kuraĝus diri, ke la tradukinto solvis la problemon de la Esp.-a komedia lingvo. Tamen la bonecon de la traduko pravas, ke krom ia supre menciita riproĉeto la kritikisto havas preskaŭ nenian rimarkon. Eble mi ne devas pri-silenti, ke la maniero, skribi la

nombrojn kiel apartajn vortojn (dek unu) iom strange aspektas. »Pleŭrezio« versajne estas uzata anstataŭ »pleŭrito«, »Nul« mi trovas senapostrofe uzata anstataŭ »nulo«, kial? Ĉu la esprimon »kunrigardante ĉion, kion mi nun scias pri li« la tradukinto vere trovas eleganta? Ĉu en la frazo »Knock palpas kaj sur fingro frapetas ŝian dorson« sur ne estas erara anstataŭ per? »Miriga homo vi estas«, ĉu ne estus pli ĝuste uzi »mirinda«?

Sed tiuj ĉi skrupuletoj tute ne malhelpis mian neĉiutagan plezuron, per kiu tiu ĉi libro pridonacis min. *Ludoviko Totsche*

FACILA LEGOLIBRO. Redaktis: K. R. C. Sturmer. 64 paĝoj. Eldonejo: The Esperanto Publishing Co. LTD. London. 1932. Prezo 1.— ŝil.

Tiu ĉi ekzerc-libro alportas novan tipon de legolibro: ĝi donas tekstojn, en kiuj la nova esperisto iom konatigas kun nia literaturo. En simpla, klara lingvo estas rakontita la enhavo de naŭ originalaj romanoj. Aŭtoroj: Baghy, Bulthuis, Engholm. Forge, Jung, Luyken, Vallienne. Rakontintoj: s-ino N. Holmes, s-roj J. F. O' Connor, A. Bodeureau, F. B. Elwell, B. M. Newell, Alec Venture, P. P. H. Ongley, A. R. Cheslyn, R. M. Morris Owen. Poste sekvas lerta propagandartikolo. *La magia tapiŝo*, verkita de Fred. E. Wadham.

Ĉefa valoro de la libreto estas la konciza raporto de W. B. Johnson pri *La literaturo de Esperanto*. Klaraj pensoj kaj klaraj

frazoj, lingvo vikle vivanta kaj pura de anglismoj faras tiun ĉi artikolon vere ĝinda legajo. Estas kompreneble, ke pro la mallongo ne estis evitebla manko de gravaj nomoj (Schulhof), krome mi ne povas prisilenti, ke la sagaca aŭtoro evidente fiasketis en la prijuĝo de niaj modernaj lirikistoj. Estas mia firma konvinko, ke Johnson iĝos serioza valoro de l' esp-a kritiko.

La libro estas denova atesto pri la nekontestebla kapablo de niaj britaj samideanoj kaj mi devas menci la nomon de Sturmer, kiu per la redaktado pruvis, ke li scias grupigi tiujn ĉi talentajn samideanojn por komuna laboro. *Ludoviko Totsche.*

C. WALTER: GAJA LERNO-LIBRO. (Eldonejo: C. Walter, Berlin, Hohenzollernstr. 11. 118 pg. Prezo: Mk. g. 1.75 + 10%.)

La eksterajo estas plaĉa, la titolo estas alloga. Kun granda fido ni eklegas la libron, kies bildoj estas same plaĉaj kaj konvenaj al la librotitolo. La unuajn du paĝojn ni preterlasas, ĉar tie estas gramatikaj klarigoj, kiujn la komencanto ne certe komprenos, sed vere la unua leciono komenciĝas tie, kie ni vidas tablon, seĝon, ŝipon, akvon ktp. Ĝis la kvina bildo ni povas krei: »Hura, naskiĝis la internacia esperanto-lernolibro, rektmetoda, moderna, bela, alloga, bonhumora, ilustrita! Sed... mi devas menci, ke nuntempe mi instruas en Svedlando kaj la sveda lingvo estas unu el la lingvoj, kie la akuzativa formo ne estas ĝenerala, sekve la akuzativo ne estas komprenigebla per

la frazo: »sinjoro mangas panon«. Sed la 5-a bildo jam faligas la lernanton en la akuzativ-maron, kaj li ne scipovas naĝi, eĉ boateton li ne ricevis de la aŭtoro. La akuzativo estas komprenigebla, sed ĝi ne estas memkomprenebla fakto por la svedoj kaj kelke da aliaj nacioj. Kaj mi nun devas iomete mallaŭtigi la hura-krion, ne naskiĝis la internacia, vere internacia legolibro, sed sendube aperis bona, lerte farita libro, kiun oni povas uzi kun vortaro, aŭ alia helplibro. Sed fari tute rektmetodan libron estas ja malfacile kaj miaj rimarkoj estas prefere *principaj*, ol rilatigitaj al la libro-individo, kiu reprezentas la avantaĝojn kaj la malfavorojn de sia metodo-speco. Oni ne povas diri, ke: »mi instruas laŭ la rekta metodo, kaj ne ekzistas alia metodo«, ĉar tiam okazas, ke ekz. tiaj vortoj, kiel *jam*, ankoraŭ kaj multaj aliaj, kiuj estas pli gravaj, ol ekz. »argano«, tute ne estas en — cetere bonega — lernolibro. Ni ne ligu nin rigide al sola metodo. Sed tiu ĉi libro estos bonega bazo por la plua agado de la aŭtoro, kies kvalitoj certe estas unuarangaj kaj esperigaj. Se mi nun iom pli longe pritraktas la libron, ol kutime, tio signifas, ke malgraŭ miaj rimarkoj kaj riproĉoj, mi taksas ĝin altvalora kaj inter certaj kadroj oni povas uzi ĝin bonege. Generalan rimarkon mi havas nur unu; la varieco povas esti ne-laciga nur ĝis certa grado, se oni troigas la variecon, ĝi perdas sian esencon. En la libro la detaloj iomete disfalas, troabundas kaj la komence vekita intereso iomete refalas, ĉar dis-

speciĝas aŭ mankas, la »epikaj-oj.« La libro reprezentas la »lirikon« en la instruado. Kaj ankoraŭ kelkajn vortojn pri la detaloj. Mi ne ŝatas la demandon, kiun la lernanto trovas komence de la libro: »Kio estas ili?« — ĉar en ĝi escepto sin kaŝas, kion oni povas rimarki kaj pro tio pridubi la regulecon de la lingvo. (Vere mi ne tute komprenas, kial oni ne povus uzi la vorton: »kioj«?) — La infinitivo, la kondiĉa formo aperas surprize, kiel fakto, sed la instruisto ja ne rajtas kredi, ke por la lernantoj estas gramatikaj faktoj. Mi havas ankoraŭ kelke da rimarkoj, sed ili devenas el miaj principaj vortoj kaj fine mi ne volas pleniĝi mian recenzon per mallaŭdoj pri libro, kiu entute estas atentinda, fantaziplena, detala kaj laŭdinda verko de sperta fakulo. Li certe kapablos verki vere internacian lernolibron, se li priatentos la plej gravajn naciajn gramatikajojn. *Szilágyi.*

REVUO DE REVUOJ

Jam plena duonjaro pasis de tiam, ke ni lastfoje trarigardis nian gazeton. Eventoplena duonjaro: kaj el la vidpunkto de nia ĝenerala movado, kaj el tiu de la literatura vivo. En ambaŭ fermentas ideoj, kunpuŝiĝas diversaj opinioj. Ne estas do mirinde, ke tiu ĉi maltrankvilo senteble travibras la recenz-kolonojn de la gazetoj, estas do facile klarigeble, ke nia nuna raporto temos ĉefe pri la problemoj, kiuj ŝvebas en la atmosfero de l' Esp-a kritiko kaj... pri la kritikistoj mem.

Sed antaŭ ol tuŝi tiujn ĉi delikatajn kaj tempest-promesajn demandojn, ni rapide traesploru la gazetojn: eble ni gajnos kelkajn serenajn momentojn dum la lego de la literaturajoj, per kiuj cetere ĉiam pli avare donacas nin la Esp-a gazetaro...

Unue ni salutu la nove aperintan *Sudan Stelon* kaj ni gratulu ĝiajn redaktoron kaj eldonanton pro la plaĉa aspekto, pro la klara preso, pro la manko de preseraroj, pro la bona stilo. Estas vere, ke iom tromultas pritraktado de personaj konfliktoj, sed el tiu ĉi infan-malsano ĝi rapide saniĝos; estas vere, ke signifa parto de la gazeto estas okupita per artikoloj, sciigoj, kiuj estas nur lokinteresaj, sekve negravas por alilanda leganto, sed tio neeviteblas ĉe landa propaganda gazeto. Pligrandigo de l' amplekso certe helpus efektivigon de la programo: la konigon de la jugoslava literaturo. Kio pleje impresas la leganton, estas la freŝa, juna atmosfero, kiu la gazeto disradias per sia vigleco kaj konscia observemo. Ni trovas du poemetojn »el la japana poemarto«, nek aŭtor-nomo, nek tradukinto estas signita, kial? — Sur kovrilpaĝo de la kvina numero mi trovis iom misteran alvokon de ia »Monda Kuriero«, en ĝi la *troentuziasma entrepreno asertas*, ke nia literaturo ne posedas revuojn, librojn kiujn ni fiere povus montri al la »ignoranta publiko«! Karaj sinjoroj, bonvolu iom

bremsi vin! ĉu vi ne povas rekلامي sen falsigo de faktoj? — S-ro Stefanĉiĉ volas enkonduki la radikon *sme* anstataŭ *darf*, *durf*, ĝi estas kunmetita el ia slava *smeti* kaj angla *may*. Li riproĉas al *darf* malbel-sonecon, li pravas, sed ni trovas tiun ĉi abortitan vortradikon sufiĉe malbela kaj tute nenecesa, oni ja povas eviti la uzon de *darf* per la helpo de *rajt* kaj *lic*. — Atentinda frazo el la programo de la gazeto: »... ni deziras montri, ke Esperanto estas ne nur komerca afero, sed ankaŭ kulturfaktoro, kiu al siaj adeptoj devas doni almenaŭ ian rekompencan por la oferita peno.« — Okaze de la naskiĝo de Suda Stelo esplingva gazeto skribis: »En la Balkanoj konstante aperas kaj malaperas Esperanto-gazetoj.« Nu, Suda Stelo meritas, ke ĝi longe ne malaperu.

Germana Esperantisto: Pri la dua eldono de Kataluna Antologio Karl Minor verkis 21 linian recenzon, en kiu li tre lerte motivas la efektivan eviton de kritika pri esploro: li citas el la recenzo aperinta okaze de la unua eldono jenojn: »... Se oni volus skribi pri ĉi tiu verko detalan recenzon, oni povus plenigi per ĝi tutan numeron de G. E. tiom interesa kaj leginda estas ĝia enhavo.« Eble okaze de la tria eldono s-ro Minor havos pli multe da spaco, mi ja trovis superfluaĵojn ankaŭ en tiu ĉi numero!

Estas vere admirinda la nelacigebla laboro de niaj japanaj samideanoj per kiu ili klopodas instrui Esperanton al siaj samlandanoj. Iliaj gazetoj celas ĉefe

Se vi estas kontenta, ne forgesu varbi por AELA kaj LITERATURA MONDO. Varbmaterialon ni sendas volonte.

tion. Mi almenaŭ menciu iliajn titolojn: *La Revuo Orienta*, *Esperanto Kiboŝa* (la bindita 1931-a jaro estas dika volumo), *Verda Mondo*, *ABC de Esperanto*.

La Praktiko: Ĝi estus ideala ekzerca gazeto por novaj esp-istoj, se ĝi ne pekus konsekvence kontraŭ la gramatiko. Ekzemple en la septembra numero sur la paĝo kvina mi dufoje trovis la esprimon: »Ĉu estas vera, ke...« Mi ne povas kredi, ke la gazeto uzas ĉi tiujn esprimojn pro pedagogia motivo, t. e. ke ĝi evitu klarigojn pri iom ne tute elementaj formoj. Instrui ion malbone por pli posta korekto: tio estus la plej absurda pedagogia principo, ja ĉiu scias, ke la unufoje ellernitaj formoj firme fiksiĝas. Kaj la gvidantoj de la Cseh-Instituto estas nedubeble tre bonaj pedagogoj... Kompreneble ankaŭ tion mi ne povas supozi, ke la redaktantoj de la gazeto ne konas la gramatikon. Eĉ preseraroj ne estas tiuj ĉi esprimoj, ĉar ili estas plurfoje uzataj. Kio do klarigas la sintenon de *La Praktiko*? Mi ne povas venki la suspekton, ke la redaktantoj ne opinias gravaj tiujn ĉi gramatikajn specialaĵojn de Esperanto (kiel ankaŭ pri *unu*, kiu denove estas uzata kiel nedifinita artikolo), kaj ili intencas enkonduki pli simplan, Csehan dialekton de la lingvo, el kiu la supre menciitaj specialaĵoj mankas. Sed tia dialekto trovos nepran kontraŭstaron de la parto de ĉiu lingvofidela esp-isto, ja ĝuste tiuj ĉi specialaĵoj donas al Esperanto apartan ĉarmon!

L' Esperanto publikas en daŭr-

igoj komedion de Goldoni, titolitan: *Kurioza okazaĵo*, en la traduko de Mevo.

Mi atentigas pri tre inteligenta artikolo aperinta en la aŭgusto-septembra numero de *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*. Ĝi temas pri tutkontinentaj lingvoj, pri internacia kaj komuna lingvo. La artikolo estas signita per literoj *Rs*. Se mi havus lokon, mi citus ĝin tute!

Espero Katolika: La bona papero, riĉa ilustrado, faras la gazeton pli plaĉa. Prezento de pli altnivela katolika literaturo ne malutilus.

*

Permesu, ke nun mi rakontu historieton. Mi havas tre karan konatulinon, ĉarman maljunan anglinon, kun la kutimaj arĝentaj haroj kaj freŝe ruĝaj vangoj, kiu vivtenas sin per instruado de angla lingvo. Okaze de renkontiĝoj mi kutimis ĉantaĝi de ŝi kelkajn klarigojn pri tekstoj de anglaj poemoj por mi tre komplikaj (kiel nekuracebla versleganto mi legas poemojn ankaŭ en lingvoj, kiujn mi ne lernis). Nu, ĝis certa limo iras bone la afero, sed se ni venas al iom pli malfacila poezia metaforo de moderna poeto, al iom pli aparta individua lingvaĵo, kiu jam superas ŝian intelektan medion, ŝi konfuziĝas, ŝi senpacientiĝas kaj subite ŝi finas la aferon (kaj ĉian pluan klarigadon por tiu fojo) per la neapelaciebla deklaro: *It is a poem.* (Ĝi estas poemaĵo.) — En »*The British Esperantist*« mi legis jenan recenzon: »Romaj Elegioj.« Sed malgraŭ (aŭ pro) multaj

neologismoj la libro plejparte ŝajnas tiel nekomprenebla, kiel enhave senvalora. « It is a poem! — En la sama numero mi legis recenzon pri Eterna Bukedo. Mi ne volas diskuti nun pri la teoria sinteno de la recenzinto, mi nur mencias, ke el hazarde nekorektita preseraro li konkludas teori-ajojn, mi citas la verslinion, ĉar laŭ mia opinio la preserareco estas tro evidenta: »Restos multa plezur, vivlonge je al vi, Catullus, « — je staras anstataŭ ja, la recenzinto opiniis, ke Kalocsay uzis ĝin memstare, kiel neprepozicion. Ĉe la fino de la artikolo la recenzinto parolas pri la elekto de la poemoj kaj laŭdante parton de la elektitaj versoj, pri la alia parto li diras jenon: »Some are too trivial to be worth inclusion; others are so obscure or involved as to be difficult of comprehension, if not meaningless.« (Kelkaj estas tro trivialaj (?) por meriti tradukon, aliaj estas tiel obskuraj aŭ komplikaj kiel malfacile kompreneblaj, se ne sensencaj.) Koncerne la meriton de ĉi tiu juĝo ĉiu konanto de la libro nur ridetos, sed rigardante el tiu vidpunkto, ke la recenzo aperis en grava gazeto, mi demandas s-ron la recenzinton, bonvolu nomi por ni, epistaj verslegantoj, la riproĉitajn »trivialajn, obskurajn, nekompreneblajn« poemojn, ĉar tiajn ni ne trovis en Eterna Bukedo. Kaj alian demandon mi havas al la estimataj redaktantoj de la gazeto: ĉu en Britlando ne troviĝas poeziema esp-ista junulo, kiu kapablus recenzi poemplibrojn, aŭ iu ajn, kiu almenaŭ ne fanfa-

ronas pri tio, ke li ne komprenas poezion? ... Ĉu pri grava verko recenzi nacilingve ne estas malĝentilaĵo al la Esp-a publiko?

En *Flandra Esperantisto* mi legis impresan poemon de Pol de Mont. Titolo: La Kondoro. Tradukinto: Jan van Schoor.

En *Belga Esperantisto* s-ro L. Cogen tradukis belan soneton de Musset (Tristesse) sen rimoj! Sapienti sat!

En *Aŭstria Esperantisto* mi trovis stile kaj enhave tre malfortan artikoleon pri *Goethe en Esperantujo*. Verkinto: Alexander Taussig.

Pola Esperantisto: Malpli da literaturajoj ol kutime. Vigla kongresa raporto verkita de s-ro Krysta.

En *Esperanto* (UEA) mi legis Schwartz-poemon pri sprita karakterizo de diversaj stomak-statoj.

En *Heroldo de Esperanto* mi trovis recenzon pri la Parnasa Gvidlibro. Mi havas similan demandon, kian mi faris al The British Esperantist: ĉu nur tiom da kompren-kapablo troveblas en Köln por la Esp-a poezio? La riproĉon pri »krom« mi ne komprenas. Ĝia esenca signifo estas apartigo. De la tuto ĝi apartigas ion, sed tiu ĉi apartigo povas okazi kaj en pozitiva, kaj en negativa direkto. Se de »nenio« ĝi apartigas »ion«, tiam ĝi jesas, se de »ĉio« ĝi apartigas ion, tiam ĝi neas.

Oomoto Internacia. Apud polemikoj pri okazintaĵoj en Ĉinio legeblas misteraj raportoj pri: Oomoto-mirakloj kaj ĉefe tre lertaj alyokoj por mona subteno (kaŝitaj eĉ en kondolencon). Kon-

stanta interrilatiĝo kun spiritoj videble ne malutilas al financa talento.

La Progreso: Inteligenta propagand-gazeto, kiu donas lokon ankaŭ al literaturaj artikoloj. En la septembra-oktobra numero mi trovis du legindajn noveletojn: Janko Jesensky: Lizo, el la slovak-a tradukita de P. Rosa, Jarmila Haškova: Jen la Homo!, el la ĉeĥa tradukita de Fr. Kruták. Ankaŭ la sincervoĉaj kongresaj impresoj de A. Tarantiková interesas la leganton. La lingvo de l' gazeto estas plaĉa.

En *Oomoto* s-ro Jozefo Major, ekseŭropano, nomas la eŭropan poezion »malsane erotika«. Nu, pri la rajto kaj morala valoro de erotika poezio mi ne volas nun diskuti, kvankam objektiva leganto ja devus rekoni, ke la du Goethe-poemoj (la artikolo de s-ro Major temis pri la Romaj Elegioj kaj La Taglibro, aperintaj en la traduko de Kalocsay) ne havas malmoralan tendencon: mi simple ne kredas, ke la erotiko estus specialaĵo de l' okcidenta poezio. Mi atentigas nur pri Gendsi Monogatari de l' japana poetino Murasaki Shikibu, pri tiu ĉi ĉefverko de japana poezio, kiun — laŭ libro temanta pri japana literaturo — pro erotikaj partoj la japanaj pedagogoj ne donas en la manon de la lernanta junularo. — Ĉu la gvidantaro de l' Oomoto-movado vere kredas, ke per atakema tono ilia gazeto povas simpatiigi la japanan aferon al la eŭropa publiko?

En oktobro aperis la unua numero de *Frateco*. La dupaĝa folio sin nomas »monata gazeto por

frateca vivo«. Religia enhavo propagandanta la ideojn de »Blanka Frataro«. La stilo: infane naiva. Sed ni trovis kelkajn perlojn inter la tradukitaj saĝaĵoj de Lao Tze; ni vidu du: »Kiam vi naskiĝis, vi ploris, kaj ĉirkaŭ vi ĉiuj ĝojis. Vivu tiel, ke kiam vi mortos, ĉiuj ĉirkaŭ vi ploru kaj vi ĝoju!« »Ĉiu vero eldirita per vortoj estas forto, kies ago estas senlima.«

Laborista Esperantisto: Ĝi publikas en nederlanda lingvo poe-tikan artikolserion por komencantaj legantoj de Esp-a poezio.

Esperantobladet raportas pri la norvega esp-ista vivo. En ĝi troveblas ankaŭ kelkaj antaŭdilu-viaj humoraĵoj.

En *Internacia Pedagogia Revuo* mi trovis legindan artikolon verkitan de D-ro Kurt Riedel pri la gravaj verkoj de Wüster. Sed pri la problemo de Esp-a frazeologio mi ne povas konsenti kun la artikolinto.

La Lumo Orienta estas kvaron-jara organo de Japana Budhana Ligo Esperantista. Religiaj tekstoj. Ĝi aperigas en daŭrigoj budhisman terminaron.

Hispana Esperanto Gazeto publikis baladon de Angel Ganivet, titolitan: La vundita ĉasisto. La poemo estas tre ĉarma kaj ia traduko de Vincent Inglada tre bona. Tamen mi ne opinias tre sukcesa la solvon de la dua strofo. Eble la eminenta tradukinto surprizos nin per pli bona varianto?

Svenska Arbetar Esperantisten: Bonstilaj recenzoj, multaj fotoj. *Internacia Medicina Revuo*, Bonnivela fakgazeto.

La socialisto: Klara preso, moderne flua lingvo.

La Interligilo de U. P. T. T. Faka gazeto por poŝtistoj.

Svenska Esperanto Tidningen: Riĉa decembra numero. El la literaturaj kontribuintoj mi nomu T. Czitrom, St. Engholm, F. Szilágyi.

La Suda Kruco aperas en nova, pli granda formato. Plaĉa aspekto, varia enhavo. S-ano Robo en recenzo citas frazon el la recenzita libro kaj subinspiras sencon, kium la frazo tute ne havis... Cu simpla eraro aŭ intenca mistifiko?

Post kvaronjaro ni daŭrigos la revuon. *Ludoviko Totsche.*

N I A P O Ŝ T O

La dua numero de la Bibliografia Gazeto estos elsendata kune kun la dua libro de AELA kaj maja numero de Literatura Mondo.

Al multaj gratulintoj. Ni tre dankas viajn favorojn, montritajn al ni. Viaj esprimoj nin instigas al plua senĉesa laborado por la pliriĉigo de nia literaturo.

S-ro C. H. en Maryland. Vi demandis la membronombron laŭ landoj. Nu plej multaj estas en Nederlando, poste sekvas laŭvice Japanujo, Britujo, Francujo, Svedlando, Italujo, Germanujo, Estonujo, Hungarujo kaj poste aliaj malgrandaj landoj.

S-ro Th. Hansen, Norresundby. Bonvolu atenti, ke la libroj, anoncitaj inter la elekteblaj libroj aparte kaj la Historio de LI, ne estas niaj propraj eldonaĵoj, do kompreneble ni ne povas respondeci pri ilia aspekto. Pri aliaj

libroj ankaŭ laŭaspekte vi estos certe kontenta.

Elektintoj de verkoj de Varankin kaj Puŝkin bonvolu atenti, ke el la unua ni havas nur broŝuritaĵajn kaj el la dua nur binditajn ekzemplerojn. Por la unuaj, kiuj mendis binditan, ni do bonskribos la prezon de bindo, dume al la duaj ni donacas binditan libron, por ke ni plene kontentigu ĉiujn niajn membrojn.

La membroj, ne elektintaj ankoraŭ la trian libron, bonvolu nepre fari tion en la proksimaj semajnoj, por ke ni povu tiun liveri!

S-rino Magnus, Orléans. La libroj laŭ plano aperos en ĉiu dua monato para. Tamen ni ne povas garantiĝi ion okaze de malfruo, pro tio ni petas vin, bonvolu afable atendi pacience, se ni eventuale malfruus iom ankaŭ ĉe la proksimaj libroj. Ili certe aperos, tion povas garantiĝi al vi la nomo de Literatura Mondo.

S-ro S. J. Lwow. Ni almetas al la nuna nro de la Bibliografia Gazeto novan ekzempleron de AELA-prospekto, por ke vi povu facile varbi. En ĝi vi trovos ankaŭ la manieron, kiel plej facile pagi al AELA. Bonvolu bone atenti la ŝanĝigintajn kotizojn post 1-a de februaro!

S-ano Hamaker, Utrecht. Via demando pri la farto de nia organizaĵo donas al ni la okazon por diri, ke ni superis niajn esperojn per 30%! Tio estu instigo por plua fervora agado.